# POLA ESPERANTISTO

XXX JARO | APRILO 1936 | 4 NUMERO

## ESPERANTYSTA POLSKI

ELDONANTO WYDAWCA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

REDAKTANTOJ REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI GIS LA 20-a DE CIU MONATO.


## REFLEKTOJ.

Grava okulmalsano tenis min dum pluraj monatoj for de aktiva kunlaboro en nia movado, kaj ne nur mia agado estis interrompita, sed entute mia kontakto kun la ĝenerala movado nuliĝis por sufiĉe longa tempo, ĉar la kuracisto severe malpermesis al mi kaj la legadon kaj la skribadon. Tiamaniere mi dum multaj monatoj vivis izolan vivon, kio por aktiva esperantisto estas preskaŭ turmenta, kaj miaj legantoj facile imagos, kun kia avido mi fine kaptis en miajn manojn la multajn gazetojn esperantajn, kiuj intertempe venis al mi el multaj lokoj.

Tiu ĉi mia kelkmonata „deviga" izoleco tamen faris al mi tre gravan moralinstruon. Kiel la proverba raŭpo, kiu sidante en la kreno, kredas, ke ekzistas nenio pli bona ol ĝi (la kreno), tiel ni, aktivaj esperantistoj, kiuj estas nekuraceble infektitaj per la verda febro, firme kredas, ke ne ekzistas sub la suno legaĵo pli interesa ol la esperantaj gazetoj. Sed kiam, post kelkmonata „deviga" paŭzo, mi komencis legi niajn diversajn gazetojn, mi kun bedaŭro konstatis, ke ilia nivelo intertempe tute ne plialtiĝis. Kontraŭe, la konata karaktero de nia gazetaro, bazita sur la t. n. „reciproka adorado", restis kiel ĝis nun, eble eĉ pli ŝablona kaj pli banala ol antaŭe. Per tio mi tute ne volas - gardu Dio! — iel ofendeti niajn redakciojn, kontraŭe — mi rajtus antaŭ ĉio kulpigi la legantaron, por kiu tia nivelo sufiĉas...

Eble nia organo, la „Pola Esperantisto" estas escepto, almenaŭ nur iom. Kiom ajn malgranda kaj malriĉenhava ĝi estas, ĝi tamen sur siaj paĝoj de 'temp' al tempo publikigas atentindan artikolon. Mi pensas al la januara artikolo de Dro Czubryński, en kiu la konata aŭtoro — mi kredas, ke li estas unu el la plej sobre pensantaj esperantistoj en nia lando — ne lamentas pri la krizo en nia movado, sed prezentas interesan projekton, kiu eble estas la sola meritanta ĉies atenton. La projekto pri la Interŝtata akordo, realigota en maniero, proponita de Dro Czubryński, ne estas nova: nia „kompatinda" doktoro alarmas pri ĝi la movadon jam de pluraj jaroj, kaj — kiel ĝis nun — ja senrezulte. Vi scias ja, kara Doktoro, ke la realigo de via projekto postulas ioman streĉon de niaj fortoj, kaj por tio nia anaro estas tro mallaborema. Cetere, en nia movado ĉiu havas sian ambicieton — kaj eminentulojn, dank' al Dio, — ni havas en granda abundo — venkas simple tiu, kiu havas pli facilan aliron al niaj „aŭtoritatoj". Tiamaniere, por atingi sukceson tiel gravan, kiel la eldono de poŝtkarto kun esperanto-teksto, oni funkciigas „plenvapore" la tutan aparataron, kiun disponas nia mondorganizo. Sed por pripensi vian projekton, kara Doktoro, mankas simple tempo, mankas mono, mankas energio, kaj se tiu ĉi preteksto ne kvietigos vin, oni trovos ankoraŭ alian kaj oni scios rakonti al vi fabelojn pri diplomatoj, ministroj kaj ambasadoroj, kun kiuj estas ligita la realigo de via projekto, kaj tiam vi fine mem kapitulacos. En nia movado

ekzistis multaj tiaj „teruraj infanoj", kiuj havis la fiksan ideon akceli la venkon de nia afero, sed niaj gloraj generaloj lerte elmartelis ĝin el iliaj kapoj. Via supozo, ke nia anaro tute ne estas tiom malgranda kaj ke ĝi, per laŭplana organizita agado povas atingi vere grandan sukceson, kia estas sendube la Interŝtata akordo, tiu ĉi via supozo, kara Doktoro, estas erara; niaj „ministroj" havas alian opinion — nia anaro havas nur du taskojn: humile obei kaj pagi la kotizon. Mi sole miras, ke vi, malnova esperantisto, tre bone konanta nian movadon, flegas en vi ankoraŭ la iluzion, ke niaj plej altaj instancoj faros ion, kio staras ekster ilia ŝablono. Almenaŭ mi jam delonge rezignis. Eble venos aliaj, kun fajra fervoro de revoluciuloj, kiuj havos la bonŝancon ripari la ekzistantan malbonon.

II

La informo pri la okazigo de la jubilea Universala Kongreso en 1937 en Warszawa elektrizis nin ĉiun, kiuj ĉi tiun vere solenan momenton ege „sopiratendas" aŭ „atendsopiras" (kiel vi volas, kara samideano Dreher). Sed se ĝi nin ĉiujn elektrizis, ĝi la plej gravaj heroojn de la afero, nome: la varsoviajn Esperantistojn, tute paralizis. Ili obstine silentas. Mi trovis en la lastaj numeroj de P. E. entuziasmajn artikolojn de „provincanoj", konsilojn, sugestojn, proponojn — mi elsentis la grandegan ĝojon, preskaŭ ekstazon, kun kiu oni akceptis la sciigon pri la Jubilea Kongreso. Sed la varsovianoj silentas. Tiuj, al kiu estas farita la honoro organizi la Kongreson, paraliziĝis. La malnova vundo remalfermiĝis: personaj, individuaj ambicietoj kaj kverelo;, spicitaj per politikaĉa pipro. Ankoraŭ nenio estas komencita en Varsovio, sed jam estas dissendita cirkulero, rakontanta aferojn, kiuj honoron sendube ne alportas. Ĉu en tiaj kondiĉoj, kun tia eksciteco vi volas, sinjoroj, realigi la Jubilean Kongreson? Ni rajtas postuli, ke ĝenerale nia movado en la ĉefurbo finfine iel organiziĝu. Viaj ambicioj, via falsa maniero percepti la esperantismon, kaŭzis ja la ĝisfundan diseriĝon de nia movado en la ĉefurbo, kaj parte ankaŭ en la tuta lando. Ne forgesu, ke la Jubilea Kogreso estos antaŭ ĉio jubileo por ĉiuj Esperantistoj -- ne enportu do la amaron de viaj personaj ambicioj en ĉi tiun grandan feston. Por la tuta daŭro de tiu ĉi jubilea jaro faru inter vi „pakton pri neagreso". Ne dissplitigu viajn fortojn por la sukceso de via malfacila organiza laboro.

Se mia modesta peto estos efikinta, neniu bedaŭros sian partoprenon en la Jubilea Kongreso, kiu devos fariĝi unika en la historio de niaj kongresoj ĝenerale.

**I. Lejzerowicz**

# IOM DA PACIENCO...

Estante jam de longa tempo abonanto de P. E. mi legas ĉiam kun sama intereso diversajn artikolojn kun bruaj titoloj, kies aŭtoroj indikas diversajn „bonrimedojn" de savo kaj subteno por nia, iliaopinie, „agonianta" jam afero. Ĉiuj trumpetas unutone, ke alvenas jam fino de esperantismo... ke nenio jam povas ĝin savi, diversaj porsavaj provoj estas jam senefikaj, kaj multaj S. O. S. „Krizo minacas k. a." vere konsternas kaj hezitigas niajn novbakitajn adeptojn de nia afero kaj forprenas al ili ĉian esperon kaj kredon je venko de Esperanto. Legante tiujn pli malpli samtemajn kaj ĝisenuige samsencajn artikolojn, analizante diversajn „rimedojn kaj rimedetojn" de savo por la „agonianta" esperantomovado mi venis al konvinko, ke niaj „fidelaj" adeptoj de nia afero, iom post iom ekkomencas mem perdi la kredon je venko kaj signifo de siaj „kvazaŭ-sanktaj" idealoj kaj seniluziiĝadas laŭgrade. Kvazaŭ volante savi la situacion, ĉiu el ili pene eltrovadas multe da tiucelaj rimedoj, sed ĉio tamen estas nur „voĉo de vokanto en dezerto", voĉo entute malefikanta. Neniu provas uzi tiujn rimedojn, neniu havas rilate tion almenaŭ ian ajn intencon, sed ĉiu nur atendas (senpacience!!) kiam jam finiĝos la agonio kaj venos la... morto de tutmonda Esperantomovado. Eĉ unu el ĉi ĉiuj rimedoj ne estis ankoraŭ prov-uzita, neniu ankoraŭ el esperantistoj ekinteresiĝis pri iu ajn el proponitaj „sav-rimedoj", ĉar neniu volas! Jes! Neniu volas; ĉiu iĝas nur geniulo por eltrovado de amasego da „bon- kaj sav-rimedoj", sed samtempe al ĉiu mankas pli granda volo, mankas laborfervoro, por siajn, eble bonajn intencojn, ekkomenci age. Kial? Miaopinie estas nur du kaŭzoj; — unua estas tiu, ke tia „eltrovinto" mem ne kredas je efiko de sia rimedo, kaj dua, ke li mem ne volas komenci aŭ almenaŭ ekzorgi por komencigi propran rimedon, kaj per tio montri, ke tiu estas la bona kaj ĝusta. Bedaŭrinde, tio ne estas. Ĉiu nur atendas ĝis iu, kiu aŭskultus kaj obeus lian „saĝan

konsilon" kaj kiu la tutan laboron, komencinte siapersone, gloron tamen kaj famon efikotan atribuus al nobla rimedeltrovinto. Unuvorte neniu volas labori, ĉiu nur parolaĉas, skribaĉas, konsilaĉas kaj tio estas tuta kaŭzo de malboro. Tro multege da krioj, tro multe da avertoj, supermulte da konsiloj, lavango da vokvortoj, sed konsterne malmultege da agoj. Dormemo, mallaboremo, manko de agvolo sur nia verda kampo, jen estas unuj el ĉefaj ecoj de karaj samideanoj kaj jen ĉiuj kaŭzoj de „Esperanto-agonio".

Kaj kiel prezentiĝas la afero rilate tiel nomitajn „vera'n esp-istojn?" Respondo la sama: tiuj ankaŭ ĝemas, ploras, plendas unu al alia, ke Esperanto-movado tiel malrapidege disvastiĝetas, ke 50 aŭ 60 novaj adeptoj nenion signifas kontraŭ milionoj da neesperantigitaj homamasegoj de l' mondpopolaro, do rilate tion, kio pro ĉi ĉio rezultas, estas jam nenia espero pri la savo por Esperanto, kiu simile al Volapük, Apolema k. a. jam antaŭe destinita estas por pereo. Do kion fari? Kion agi? Kiel procedi? Respondo ĉiam la sama: — konsili kiel kontraŭstari malbonon! Dissendadi per gazetoj detalajn priskribojn de l' savmanieroj, de l' savrimedoj... kaj pacience atendi ĝis kiam ĝu enkondukos ilin en la vivon, de nia movado. Kaj kia estas finfine rezulto? Nenio, komplete nenio, kiu eĉ troe priatestas la aktivan agadon de niaj samideanoj, laborantaj en „sankta fervovo" por bono de „Interna Ideo" kaj venko de l' Verda Stelo.

Observante ĉi ĉion el unu vidpunkto mi povos doni nur tian „konsilon": Samideanoj! Iom da pacienco kaj spirita ekvilibro! Lasu jam enpace viajn saĝajn konsilojn kaj rimedojn, ĉesu jam ludadi je senfina verkado de artikoloj, kiuj viaopinie estas la enkorpiĝo de vera saĝeco kaj sola „ rimedo" de l' savo por „agonianta" Granda Ideo de nia Majstro, sed armiĝinte je pacienco, pleniĝu viajn dezertajn korojn per kredo kaj konvinko pri venko de nia movado. Anstataŭ plendadi malesperi kaj senfine konsiladi, ekpensu pli bone pri neprege bezona laborkomenco! Sed kion ni faru? -- unu el vi demandas, (prave!) kaj mi al tia demandanto donas jenan respondon: — faru ĉion, kion nur vi opinias kaj konsideras bona kaj utila por nia movado! Kion ajn, sed faru, anstataŭ vane krii kaj memoru, ke pli bone estas malmulte agi, ol multegon vane paroli. Ĉesu jam konsiladi al aliaj, kion ili faru, sed ekkomencu tiun faradon mem, kaj dum via konsilo estas bona, dum rezultoj de via agado estos kontentigaj kaj utilaj, tiam certe ĉiuj akceptos, sed antaŭ ĉio vi, kara konsilanto, nepre devas sendormemiĝi mem kaj forskui de vi vian maldiligentemon. Antaŭ ĉio vi devas nepre mem montri al ni, ke vi, vere efike laboras por nia movado.

Laborante, estu pacienca kaj atendu kun kredo, ke kvankam malrapide, sed ĉiam konstante proksimiĝas la gravaj momentoj de la nova esperantisma epoko, en kiu ni, esperantistoj, ĉesos jam serĉi nene novajn anojn por unu el plej nobla kaj altaj ideoj de l' homaro, sed multaj, multaj tiuj, kiuj nin moke priridadas, serĉados nin mem, ĉar ili ekkomprenos ke nia aspiro al grava celo de tuta pacifisma homarparto, estas same por ili ankaŭ treege bezonega. Mi forte kredas, ke jam proksimiĝas la momento de l' venko, sed por ĝisfine persisti, oni devas havi iom pli multe da kredo, kompare al tiu. kiun ni havas nun. Ni penu konvinkadi nin, ke nur laboro, laboro ofte oferema, laboro iafoje eĉ tre malfacila, pli — malpli frue alportos al ni tion, je kies veno ni jam ĉesas kredi kaj kion delonge jam pridubis. Kaj niaj „saĝaj konsiloj"? Niajn „saĝajn konsilojn" ĉiu lasu nur al si, ĉar ili estas tute senbezonaj por bono de nia movado, kiu same sen similaj saĝajoj iras ĝustan vojon. Do nenio malbona nenio danĝera minacas nune al nia movado? -- ni jam aŭdas demandon -- kaj mi konvinke respondas: -- Nenio! Tro forta estas nun nia movado, ke io aŭ iu povu ĝin malestigi kaj neniigi, kaj ĉi ĉio, kio laŭ nia konsidero estas malbonaĵo en nia movado, ĉi ĉio estas nur necesa periodaĵo kaj pasotaĵo, kiu neniel povas malutili al nia afero. Ni kredu, ke tiuj „danĝeraĵoj" forpasos mem, sen nia „ursa helpo". Ni ekvolu kompreni, ke tion, kio estas la sekvo de l' estinta misagado sur verda kampo, tion kio ŝajnas esti al ni malbono pro iamaj misfaradoj, tion ĉion niaj „geniaj" fortstreĉoj de menso neniom estos povantaj aliigi kaj glatigi malĝustaĵojn. Do, anstataŭ konsili, ni laboru, anstataŭ malesperi — kredu kaj aspiru obstine al Granda Celo, kiu pli aŭ malpli frue estos de ni atingita. La ĉefaĵo tamen estas nur jeno... **ke kaŭzojn de malbonaĵoj ni serĉu** (kaj ni certe trovos) **nur en ni mem.**

**Matwiejczuk Eugenjusz**

(Szczakowa)

## SUR POŜTKARTO.

Karaj Samideanoj! Mi longe, longe dum kelkaj jaroj, meditis pri la kaŭzo de modesteco de nia ĝenerala esperanta sukceso. Jam multaj provaj jaroj feliĉe pasis, ekzameno kun laŭdo farita, sed kie estas praktikaj rezultoj? Ili tute ne ekzistas! Kia estas do la kaŭzo de tiu stranga fakto? Ŝajne mi trovis ĝin kaj se s-ro Redaktanto permesus, mi sciigos vin, karaj samideanoj. Kaŭzo kuŝas en stato de la kompleta memkontenteco, kiu reĝas en nia esperantista mondo. Vere ni havas belsonan, perfektan lingvon, altajn instituciojn, enhavriĉajn jurnalojn, oferemajn em'nentulojn kun recesa por idolanoj „familio" en mezo, cetere vicojn da konfesantoj — malgrandan popolon esperantistan. Bedaŭrinde tiu ĉ: popolo estas tute paca kaj memkontenta. Tute fremda kaj eĉ ekstera por ĝia konscio, praktika agado okazas tre malofte kaj nur por la „gloro" en esperantista mo-do, legu — por la artikoloj en esperantaj jurnaloj. (La lasta frazo ne estas komprenebla aŭ — nur tre malfacile. — La Red.) En tiu ĉi stato popolo dum tiom da jaroj estas plene disvolviĝinta kaj ne-ion novan oni povas tie ate-di. Verdire tiu ĉi popolo devas nomiĝi nur „Esperintistoj". Ĉu ekzistas iu rimedo? Povas esti, ke iam oni trovos ĝin granda, plensukcesa, mi nur povas proponi enkonduki en nian aferon plenan s e n n o m e c o n de ĉiuj agantaj kaj skribantaj pri agoj kaj lingvdemandoj personoj. Faru ĉiam tiel, kiel komence faris Majstro. Bedaŭrinde iu ŝanĝis tiam opinion de tiu plej modesta homo ka: tiu ŝanĝo multe malhelpis Esperanton.

**Sennomulo esperanta.**

## ANTAŬ LA TUTPOLLANDA

Mi kutimis lasttempe esplori la numerojn de „Pola Esp." el lingva vidpunkto. Tamen la tri unuajn de 1936 mi escepte trarigardis el vidpunkto tute alia. Ĉiufoje mi turnis mian atenton al la movado, lasante por alia okazo la lingvajn konsiderojn.

Tre prave skribis Suvalkano ka: Schuster, ke ĉiuj nur plendas kaj lamentas la krizon, neniu kun fido je la estonteco — eklaboras por ŝanĝi la situacion. Do ili vokas: ek' al la laboro! Mi resonigas tiun vokon: lasu la vanan ĝemadon, eklaboru!

La Pentekosta Tutpollanda akceptu mian jenan proponon:

Ĉar ĝis la Jubilea Kongreso Varsovia 1937 restas nur iom pli ol unu jaro, sekve laborplano du- aŭ trijara jam ne estas projektebla — mi projektis ĝin al la ekzekutiva komitato de PED en la pasinta jaro — ni povas nun fari ion alian:

La Tutpollanda decidos premion solene ĉe la Jubilea kongreso enmanigotan al tiu pollanda grupo esperantista kaj al tiu ĝia ĉefa agito, kiu ĝis la Jubilea kongreso estos plej bone kaj efike laborinta por Esperanto.

La kriterio de la efikeco estas simpla kaj okulfrapa: la premion ricevas tiu grupo, kiu venigos al la Jubilea Kongreso en Varsovio la plej grandan nombron da kongresanoj. Devas esti konsiderataj la nombro de la urba (urbeta) loĝantaro, la distanco de la urbo (urbeto) ĝis Warszawa k. s. Ekz. Łódź devus alporti al la kongreso ĉ. 10-oble pli multe da kongresanoj ol Lwów, ĉar Łódź estas ĉ. 2-oble pli granda kaj ĉ. 5-oble pli proksima.

Detalajn normojn de taksado fiksu la Pentekosta Kongreso en Kraków.

Kiel supre dirite mi lasas lingvajn problemojn por alia tempo; la nuna devas esti streĉe dediĉata al la sola problemo: kiel progresigi nian movadon antaŭ la 50-jara jubileo de Esperanto.

**Dr. L. Dreher.**

**MIECZYSŁAW OBARSKI.**
**Ĉefredaktoro de la Pola Agentejo Telegrafa (PAT).**

## *La nova organizo en la transsendado de komunikoj de la PAT-centrejo en Varsovio al la provinca gazetaro.*

La novembra numero de „Prasa", la gazet-organo de la eldonista sindikato en Varsovio, publikigis la ĉi-suban artikolon de la Ĉefredaktoro de PAT, s-ro, Mieczysław Obarski.

La novaj aranĝoj de la PAT., certe estos interesaj por la legantaro de „Pola Esperantisto", tiom pli, ke PAT., la

oficiala pola agentejo ofte dissendas al la pola gazetaro ankaŭ komunikojn pri la esperanto-movado*).

Antaŭ la artikolo de redaktoro Obarski mi prezentos en kelkaj linioj mallongan skizon pri PAT, kiu liveras materialon al la tuta pola gazetaro, kaj kiu kunlaboras kun similaj institucioj en la tuta mondo.

PAT, estis fondita de kelkaj ĵurnalistoj, en novembro 1918, en la momento, kiam la okupintoj de Polujo forlasis nian landon. Unu monaton poste, la pola registaro deklaris la Polan Agentejon Telegrafan, kiel oficialan registaran agentejon. Krom la interŝanĝo de telegramoj kun preskaŭ ĉiuj gazet-agentejoj en la tuta mondo, PAT, havas siajn konstantajn korespondantojn en ĉiuj ĉefurboj de la mondo, kiuj per telegrafo kaj telefono, komunikas tuj al Varsovio pri ĉiuj pli gravaj okazintaĵoj. PAT, estas nun aŭtonomia, ŝtata entrepreno; ĝi konsistas el multaj fakoj eldonas multegon da diversaj bultenoj, kiel: ĝenerala, politika, ekonomia, kulturo-artista (ĝuste en la lasta aperas la notaĵoj pri esperanto), filma, ilustra, k. a. Krom tiuj konstantaj bultenoj, kiuj atingas ĉiutage multajn centojn da folioj, eldonas PAT. ankaŭ kelkajn periodaĵojn, kiel „Novaĵoj pri la haveno en Gdynia", katalogoj pri la pola kaj eksterlanda gazetaroj, k. s. Trifoje ĉiutage per radiotelegrafa vojo, speciala servo s. t. „POLPAT", priservas multajn agentejojn en ĉiuj kontinentoj, informante pri la atentindaj okazintaĵoj en Polujo. — HENRYK GIELB.

---

La dissendado de komunikoj de la centrejo de PAT. en Varsovio, al la provinca gazetaro. ĉiam forte okupis la direkcion de PAT.

Kiam la dissendado de komunikoj al la varsovia gazetaro estis tute facila, oni havis multajn malhelpaĵojn en la havigo de tiu materialo al la provinco, sekve, la provincaj redakcioj ricevadis la samajn komunikojn kun multa malfruiĝo, kompare al la redakcioj en Varsovio.

Tio kaŭzis oftajn plendojn de la provincaj eldonejoj, kion oni tamen ne povis plibonigi, ĉar la teknikaj ligiloj en Polujo — telefono, telegrafo kaj radio — ne povis estis plene uzitaj por la SPECIALAJ bezonoj de l' gazetaro, postulanta la plej eblan rapidecon.

Nur la eltrovo de bonegaj aparatoj telegrafaj, tiel nomataj, skribiloj je distanco, aŭ malproksimskribiloj, kaj la konstruo de novaj subteraj elektro-kabloj, dum la lastaj 3 jaroj, kreis novajn teknikajn eblecojn, kiujn oni povis apliki al la specialaj bezonoj de la gazetara informa-servo.

Dank' al ĉi ĉio, same kiel dank' al la favoro de l' Ministerio por Poŝto kaj Telegrafo, ĉiam montrita al PAT. kaj al la bezonoj de la gazetaro, — la Direkcio de PAT, sukcesis organizi la transsendadon de sciigo: al la provinca gazetaro en la plej bona maniero, kiun nur permesas la nuntempa komunikilaro.

La informo-servo de PAT, organizita en la jaro 1935, atingis kiel eble plej altan nivelon, kio trovis plenan rekonon kaj aprobon ĉe la tutlanda pola gazetaro.

La novaj malproksim-skribiloj estis aplikitaj en PAT, en la jaro 1932. Fine de la jaro 1933, la Ĉefdirektoro de PAT, Ministro Konrad Libicki, aprobis ĝeneralan planon por pliboniĝi la ligilojn de la PAT-centrejo en Varsovio kun la provinca gazetaro.

La realiĝo de tiu plano daŭris dum la jaro 1934/35. PAT, luo-prenis de la Ministerio por Poŝto kaj Telegrafo specialajn, senperajn elektro-kablojn, kiuj kunligas la Pat-centrejon en Varŝavo kun ĝiaj ĉiuj filioj tra la tuta lando. Tiuj kabloj estas disponigitaj al PAT, dum 24 horoj sen interrompo. Je tiuj kabloj estas instalitaj la menciitaj malproksimskribiloj, priservitaj de la PAT-centrejo en Varsovio. Samajn malproksimskribilojn de PAT, aranĝis en siaj redakcioj, kelkaj pli gravaj taggazetoj en Varsovio.

Ĉiuj tiuj malproksimskribiloj-akceptiloj estas priservataj de unu aparato instalita en la PAT-centrejo. Ĝi sendas 430 literojn — ĉirkaŭ 50 vortojn dum unu minuto. La sciigo notata en la centrejo en Varsovio estas samtempe skribata de la malproksimskribiloj en kelkaj varsoviaj redakcioj kaj en ĉiuj filioj de PAT, tra la tuta lando.

En la provinco, la akcepto - aparato presas la akceptitan tekston per tuĉo he-

---

*) Sro Redaktoro Antoni Pisarski-Woydakowski (Warszawa, ul. Królewska 5, PAT, Skrytka pocztowa 408) estas nia samideano kaj zorgas pri tio, ke diversaj priesperantaj komunikoj aperadu en bultenoj de PAT. Bonvolu sendadi al li gravajn komunikojn pri la Esp.-movado, gazetojn kaj aliajn eldonaĵojn. Ĉi tie ni kore dankas al la estiminda redaktoro de PAT pro lia tre valora agado.

La red. de P. E.

ktografa, kaj tiu skribaĵo tuj estas multobligata per hektografo en bezona nombro da ekzempleroj, kiuj estas dissendataj al la redakcioj, aŭ prenitaj de redakcio-knaboj. Post kelkaj minutoj, la komuniko kuŝas sur la redaktora tablo **samtempe** en Varsovio kaj en la tuta lando. La grandan utilon de la novaj aranĝoj oni povas kompreni, komparante la nunan staton kun la antaŭa. Ĝis nun, la telefonogramoj de PAT, estis havigataj al la filioj per telefono. La deĵora redaktoro diktis la telefonogramon al stenografisto, tiu poste maŝinskribis la stenogramon kaj la maŝinskribaĵo multobligita estis sendata al la redakcioj. Se ni konsideras, ke maŝinskribi stenogramon daŭras trioble pli multe ol ĝin dikti, ni povas kalkuli post kioma tempo la komuniko estis veninta en la provincan redakcion.

Ni prenu serion da telegramoj, kies diktado daŭris ½ horon, maŝinskribi tiujn telegramojn necesis 1½ da horo. Duono de la materialo estis havigita al la redakcio kun pli ol unu-hora malfruiĝo, kaj la resto kun pli ol duhora malfruiĝo. Oni komprenas bone, kion signifas duhora malfruiĝo por redakcio, kiu devas fermi la numeron kaj volas doni en ĝi kiel eble plej multan materialon aktualan, aŭ por redakcio, kiu havas difinitan horon, en kiu aperas la gazeto, — aŭ fine pro tio, ke la nokta laboro en la presejoj estas pli bone pagata.

Nun, dank' al la enkonduko de la novaj aparatoj la redakcioj en la tuta lando ricevas la materialon **samtempe** kun la varsoviaj redakcioj, en tempo tiom rapida, kiel nur permesas la redakcia laboro en PAT.

Laŭ la propraj spertoj, same kiel laŭ la opinioj de specialistoj en la kunligotekniko, oni povas aserti, ke la priservo-organizacio de la Pola Agentejo Telegrafa al la provinca gazetaro en la tuta lando, fin-aranĝita en la jaro 1935, estas perfekta, simila kiel en aliaj plej grandaj telegrafo-agentejoj en Eŭropo.

Tradukis: **Henryk Gielb.**

## *Stranga striko antaŭ 2.200 jaroj.*

La roma historiisto Livius rakontas en la IX-a libro de siaj analoj amuzan iom historieton pri flutludistoj plenumantaj sian oficon laŭ roma rito ĉe religiaj solenoj kaj oferdonado, kiujn ili antaŭsignalis, ricevante por tio vivnutraĵon kiel salajron.

Jen la raporto de Livius (IX, ĉap. 30):

**El la sama jaro (337 a. K.) mi povus preterlasi aferon tro malgrandan por rakonto, se ĝi ne ŝajnus koncerni la religian vivon. La flutludistoj koleriĝintaj, ke la novaj cenzoroj rifuzis al ili la nutradon ĉe la templo de Jupitero, kio estis antikva tradicio, foriris are en (la proksiman urbeton) Tibur kaj estis neniu en la urbo, kiu povus flutsignali la oferadon. La religia timo pro tiu akcidento okupis la senaton, kiu sendis al Tibur legacion petontan revenigi Romen la flutistojn. La Tiburanoj konsente tion promesinte ordonvenigis ilin unue en la urboficejon kaj persvadis al ili reveni Romon; kiam tiuj ne volis inkliniĝi, ili** aplikis al tiuj rimedon tute ne fremdan al sia karaktero.

Solenan tagon unuj invitas la aliajn ŝajnigante, ke ili deziras aldoni brilon al la festregalo per flutludo kaj ebriiginte per vino (kion simila speco da homoj preskaŭ avidas,) dormigas ilin kaj kvietigitajn tiamaniere per dormo enŝlosas en kaĝoveturilojn kaj transportas Romon.

Tiuj ĉi rimarkis tion ne pli frue, ol ĝis kiam la kaĝoj estis restigitaj sur la ĉefplaco kaj ilin, havantajn drinkhaoson en la kapo, surprizis la suno. Tiam fariĝis amasa kurkunveno de loĝantaro kaj ricevinte konsenton pri restado oni koncedis, ke la flutistoj ĉiujare dum tri tagoj vagpaŝadu en kostumoj tra la urbo, kantante kaj diboĉante, kio nun iĝis festa soleno, kaj restituis al la flutistoj la rajton de nutrado en la templo.

Wejherowo, en marto 1936.

**Józef Orzech**

---

**UWAGA!**

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto" uskuteczniać można na konto PKO Nr. 406.660 lub **przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr. 29.** co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

**NI TRE AFABLE PETAS NIAJN ABONANTOJN, ŜULDANTAJN ANKORAŬ LA ABONON POR J. 1935, PAGI LA ŜULDON JE NIA KONTO PKO No 406.660.**

**Zawiadamiamy, iż „Ondo de Daŭgava" nie będzie wydawane w roku bieżącym.**

# VII. POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO.

**Adreso:** P.E.D., Kraków, ul. Lubicz 34.

**Kotizo:** zł. 4.—, por familianoj, studentoj zł. 2.—. por senlaboruloj kaj blinduloj senpage. Konto P.K.O. Nr. 411.404 (Delegacja Esperantystów w Polsce).

**Fervojrabaton** prizorgos P.E.D.

**Blindulkaso:** por helpi al blinduloj multenombran partoprenon estas danke akceptataj mondonacoj.

**Loĝejoj:** pro multnombra vizitado de Kraków en tiuj ĉi tagoj estas necesa frua mendo.

**Ekzamenoj** okazos la 31. V.

**Organiza Komitato.**

Samtempe kun la Kongreso okazos en la tagoj de 31. V. — 1. VI.

**ĜENERALA KUNVENO DE P. E. D.**

En ĝi rajtas partopreni la aliĝintaj grupoj per siaj rajtigitaj reprezentantoj. Ĉiu reprezentanto devas posedi skriban rajtigon, en kiu estu citita nombro de la membroj. Ni atentigas, ke laŭ art. 10 § 2 membroj, kiuj ne pagis la kotizon, ne rajtas voĉdoni.

**Tagordo:** 1. Raportoj, 2. Decido pri la enskribpago kaj kotizo. 3. Fikso de la sekvanta G. K.. 4 Elektoj, 5. Demandoj kaj proponoj. Proponoj pri la tagordo devas esti senditaj 2 monatojn antaŭ la G. K.

Art. 26. § 1. La G. K. estas decidopova se la ĉeestantoj rajtigitaj al voĉdono reprezentas minimume 1/4 da ĉiuj voĉoj, per kiuj disponas ĉiuj membroj de P.E.D. kune.

§ 2. Se la G. K. ne okazus pro manko de la nombro necesa laŭ § 1, devas la Estraro en du sekvantaj semajnoj kunvoki denove la G. K.. dum kiu la decidoj estas alprenotaj sendepende de la nombro de reprezentitaj voĉoj .Tiun ĉi novan G. K. ne koncernas normoj de art. 21 §§ 1 kaj 2 art. 25 § 3 alineo 1.

**Estraro de P. E. D.**

**DR. LEOPOLD DREHER**

# PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO

**verkita de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Eld. de Literatura Mondo, Budapest 372 paĝoj.**

Tri monatojn mi legis la libron. Malgraŭ, ke mi ne uzas plu vortaron, legante esperantaĵojn...

Ja estas verkego. Kaj ne beletristika, sed instrua, eĉ: instruplena.

Kompreneble, kiam neesperantisto vidas ĝin, li (aŭ ŝi) fortimiĝas: „kie do estas tiu laŭte reklamata facileco de Esperanto?!"

Sed jam sufiĉe. Ni estas ja inter ni ne bezonantaj konvinki unuj aliajn, nek malkonvinki. Ni trarigardu la libron, kiel oni trarigardas ĉiun alian gramatikaĵon, kaj ni kontrolu ĝian ĝustecon.

Tri monatojn mi legis la libron. Kaj tamen ne pli ol la kelkajn sekvantajn mi trovis dubindaĵojn:

La ĉefa koncernas la vortfaradan sistemon. Mi ne nur dubas, sed eĉ estas certa, ke el cent legantoj naŭdek naŭ ne komprenas jenan diraĵon, trovatan sur p. 38 § 20: ĉiam laŭ analizo E ligiĝas ino, ulo, eco. Nu, ĉar kiel ekzemploj de analizo E estas montritaj: membro-abonanto, tajlor-majstro kaj sciencculpedagogo, kiuj signifas, ke temas pri membro, kiu estas abonanto, tajloro, kiu estas majstro; scienculo, kiu estas pedagogo, sekvas, ke ekz. stratulo estas strato kiu estas ulo, ĉu ne?

Laŭ Kaloscay jes, sed laŭ la simpla prudento de la „homo sur la strato", ne!

Sed kion mi jus skribis, komprenos nur tiu, kiu jam konas la t. n. „vortefikon" de la aŭtoroj de la libro. Pri ulo speciale, pli bone komprenos min Kalocsay mem, kiam mi mencios, ke tute nebezone li faris sufiĉe grava la escepteton de Zamenhof pri „mia karo, mia belo", escepteto solsole poezia kaj ververe — escepta. Li ja citas inter la ekzemploj de § 57: Mia belo estis juna dano, por montri kiel belo fariĝas persono.

En § 25 ne estas (aŭ ne sufiĉe estas) konsiderita la predikatiĝa efiko de verba ĉefelemento post adjektiva flankelemento, ekz. bontrovi, ruĝpentri, glatrazi, kulpjuĝi. Komp. § 431.

Anstataŭe, tute malĝuste estas ĝeneraligita la predikatiga efiko de la verba ĉefelemento: laŭ Kalocsay disiri estas iri disaj, kunveni estas veni kunaj, kunpremi estas premi kuna; laŭ mi: iri disen, veni kunen, premi kune(n) aŭ kuna(j) (jes, ankaŭ!).

Ne devas esti ensistemigata bonveni,

kiun mi konsideras fremda, neesperanta kunmetaĵo, almenaŭ koncerne ĝian sencon.

**Plenŝtopi** ŝajnas pli respondi al **ŝtopi plene** ol **ŝtopi plena**, kvankam ekzistas en la praktiko nenia diferenco.

Sur p. 45 **necesus diferencigi** inter **morgaŭ** kaj **morgaŭe**. Temas pri tio, ke se enradikiĝus **morge** (kun hodie hiere, apene ktp.), for estus la utila distingo de **morgaŭ** kaj **morgaŭe** (morgee?).

Skribante pri tiaj vortoj kiaj **estas trimasto, triangulo** (§ 41) la aŭtoroj konfesas, ke formuli ilin laŭ ĝenerala de ili alprenita formulo ŝajnas iom komplike. Tiajn vortojn oni **sentas** iel „strečitaj". Laŭ mi, multaj **el la formuloj** kreitaj **en** la libro ŝajnas iel „strečitaj", ekz. nur por nepre **ŝtopi ĝin en la formulon**, oni citis kiel ekzemplon: plenplena=plena je pleno. Kion **signifas** tiaĵo? Ĉu ne pli ĝuste estus diri, ke plenplena konsistas el la prefiksiĝinta **plen-** (=plene) plus la radiko **plena**. Komparu, kion mi diris pri **plenŝtopi**.

En § 49 preter estas diskutata la problemo de -ebl- en la esprimoj **reveneblaĵo** kaj **venkebleco**. Tute prave la aŭtoroj diras, ke ĉar **reven'** estas netransitiva, **reveneblaĵo estas** komprenata kiel reven-eblaĵo t. e. eblaĵo reveni, dume venk' estas **transitiva**, tial **venkebleco** = ebleco esti **venkata**. En la praktiko tiu klarigo montriĝos verŝajne senefika: ja, kiu akre dismetas en parolado venk' kaj ebleco, tiu povas facile efiki, ke la aŭskultantoj komprenos lian diraĵon: ebleco de venkado...

Ĉe § 54 **mankas klarigo** pri la diferenco inter **amuzaĵo** kaj **amuzilo**, **armaĵo** kaj **armilo**, **legitimaĵo** kaj **legitimilo**, **ŝtopaĵo** kaj **ŝtopilo** ktp. Dum oni rajtas intermikse (aŭ preskaŭ intermikse) uzi **ŝtopaĵo** kaj **ŝtopilo**, **legitimaĵo** kaj **legitimilo**, ne estas **tiel pri ilustraĵo** kaj **ilustrilo**, kiun lastan mi komprenas kiel ian objekton uzatan por ilustri. Komp. fotografaĵo-fotografilo. Ankaŭ **citaĵo** ne estas senhezite komprenebla kiel io, kio citas aŭ per kio oni citas. Mi preferus **klasi ĝin sub e)**: objekto de cito, io kion oni citas.

Mi ne konsentas kun § 60 punkto 3-a, laŭ kiu „post adjektivaj radikoj **ejo** funkcias substantivige: malliberejo: ejo de mallibero; densejo: ejo de denso; vastejo: ejo de vasto; malĉastejo: ejo de malĉasto" ktp. Laŭ mi, **tiuj adjektivoj** unue **verbiĝas**: malĉastejo pli memorigas lokon, kie oni malĉastas. malliberejo lokon, kie oni malliberigas. Sed eble mi eraras. Ejo post adjektivo estas ja tiel malofta!

En § 69 la aŭtoroj forgesas, ke **-ujo** ne „ofte", sed ĉiam havas pluraligan efikon. Alie ekz. **cigarujo** povus signifi: ujo de cigaro. Al pluralaĵoj apartenas ankaŭ salo, akvo, pipro, inko kaj aliaj aĵoj troveblaj en la naturo en kvanto nelimita, tial **salujo** ne estas escepto. Ŝimile **Polujo** entenas plurajn Polojn kaj **pirujo** plurajn pirojn. Kontraŭe **-ingo** entenas nur unu objekton.

Ĉe § 73 valorus mencii, ke **falebla**, kvankam malfacile imagebla, estas tamen tute bona ekz. en **surfalebla**, ekz. multaj vojaĝantoj estas surfareblaj laŭ la opinio de rabistoj. Surfalebla = atakebla.

Mi konsentas kun Butler (v. British Esperantist febr. 1936), ke **konfuza konduto** pli similas al konfuzanta konduto ol konfuziĝa konduto. Eble erarigis la aŭtorojn la kelklingva „konfus". Ankaŭ **ĉagrena koro** devus limiĝi al la poezio (§ 83 punkto 3-a).

Samloke (sub V) ni trovas **ĉesita**, kiun mi trovas erara. Mi dubas ankaŭ, ĉu **enveturigi** povas vere anstataŭi la pli longan enveturil-igi.

Samtie sub VI.: inter **kunamatigi** kaj **dissekigi** mi ne vidas multe da analogeco.

La divido de la t. n. prefiktoidoj ŝajnas iom arbitra (§ 88).

Estas ia eraro en la aserto de § 124, ke seni povus anstataŭi malhavi kaj ambaŭ montrus, ke ne nur oni ne havas ion, sed eĉ sentas dolore tiun mankon. Laŭ mi nek seni, nek malhavi povas esprimi tiun senton, sed estas simple konstatoj pri manko.

Laŭ § 209 **multo da (kelko da)** „ne enradikiĝis". Kial ne? Kontraŭe.

La esprimo **entjera nombro**, ĉu ĝi estas necesa, anst. **tuta nombro** (p. 177)?

**La plej lerte** (§ 220), laŭ Zamenhof, estas tamen sensenca, malgraŭ ke Z. ĝin uzadis laŭfrance, ĉar franco diferencigas superlativon de komperativo per aldono de la artikolo (le, la), sed Esperanto tion ne bezonas. Mi miras, ke la kleraj aŭtoroj ne korektis tion, kvankam ili ne hezitis malaprobi tiom da aliaj Zamenhofaĵoj.

Oni ne rajtas konsili senrezerve (§ 259): Teraĥ prenis sian filon Lot, filo de Haram, anst. filon de Haram. Komparu: „mi trovis la reĝon Karlo, bela junulo". Ĉu ne pli klara estus: belan junulon, por ne pensigi: mi trovis, ke la reĝo Karlo estas bela junulo.

**Kial** (§ 273) nur post **ema, kapabla, preta** oni povas uzi infinitivon, ne an-

kaŭ post **fiera, kontenta, kompetenta, libera, singardema, certa?**

Ne sole la aŭtoroj, sed ankaŭ multaj eminentaj samideanoj uzas: preferi ion al io. Mi preferas — **preferi ion ol ion,** ĉar la senco de **preferi** estas **ŝati pli ol** (paĝo 261).

P. 263: **arogi al si fari..** Kion **signifas arogi** sen: al si, se nur: **arogi al si estas** ebla?

Oni povas dubi ĉu efektive **depost 30 jaroj** = de la fino de 30-jara daŭro (§ 322).

Ĉe § 330 mankas klarigo pri metafcra signifo de **kovrita de neĝo,** alia ol **kovrita per neĝo.**

P. 287: Estas neklare, kion celas la proponita **ajne — ajne,** ofte ja sufiĉas **ĉu** — ĉu, ekz.: vi povas nun ĉu leĝi ĉu promeni. Tial la propono ne akceptiĝos verŝajne.

Mankas la esprimo **aliflanke, aliparte.**

Butler rimarkigis, ke por angla esperantisto **mi sendos la artikolon ĝis dimanĉo** (§ 323) sonas kiel: mi sendados de nun kaj finos sendi nur dimanĉe. Vere interesa rimarkigo, kiu pruvas ke en lingvo internacia oni devas zorge eviti dusencaĵojn.

Li ankaŭ turnis la atenton de la aŭtoro al la necerteco de la senco de **certa** (195, 213) disvastigata de la aŭtoroj, ĉar kion povas ekz. signifi: li havas certan salajron? certigitan? ian? Do kian?!

Mi citis faskon da problemoj, pri kiuj oni povas diskuti, sed la leganto, kiu konsideros la abundegecon de la materialo tralaborita de la aŭtoroj en la Gramatiko, facile konscios, ke da interesaj problemoj li trovos tie ne cent- sed miloble pli multe. Se mi volus mencii ankoraŭ aliajn, mia artikolo fariĝus tro longa. Sed mi rezervas al mi la ŝancon ankoraŭ reveni al la libro kaj iom daŭrigi diskutadon kun la aŭtoroj de Plena Gramatiko de Esperanto pri aliaj problemoj tuŝitaj en la verko.

Intertempe, mi konsilas al ĉiu serioza esperantisto havigi al si. la libron. La detalega indekso troviĝanta ĉe la fino, servas facile kiel gvidilo al serĉanto: ĉion dubeblan la alfabeta listo tuj trovigas.

## ALIAJ RECENZOJ.

**Kudlago, la malgranda eskimo.** De N. van Hichtum. El la holanda lingvo tradukis S. D. Mannoury. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 40 paĝ. Prezo 0:75 sved. kr.

Jen libreto por novuloj kaj junuloj, kiun ili kun ĝojo kaj utilo legos. La simpla, reala rakonto pri la simpatia eskima bubo Kudlago vekos rian simpation por li kaj lia popolo. La leganto ekscias multon pri la vivado kaj morcj ĉe la eskimoj, ni vidas kiel Kudlago ĉasas fokojn kaj ursojn, kiel li kaj lia patro konstruas boaton kaj sledon, kiel ili batalas kontraŭ neĝo kaj glacio, frosto kaj ŝtormo, sed ankaŭ kiel ili kun siaj najbaroj ĝojas kaj festas.

Tamen — brile la verkisto pentras la amon, kiun havas la eskimoj al sia, laŭ nia opinio malagrabla, lando. Kudlago ne volas forlasi ĝin por veturo al pli sudaj landoj. ĉar li ne volas malhavi la ĝojon, kiun donas al li ĉasado, aŭ la frandaĵon, kiun reprezentas la graso de ĵus kaptita foko.

La lingvaĵo estas glata, kaj oni plene povas rekomendi la libron al komencantoj kiel ankaŭ al pli lertaj esperantistoj, kiuj deziras sin distri per legado de interesa rakonto.

La kovrilo prezentas tutpaĝan originalan bildon de la malgranda Kudlago kaptanta fiŝojn. •

**Vortaro Portugallingva-Esperanta.** Eldonita de Lingva Komisiono de Esperanto. Rio de Janeiro 1936.

Tri bravaj senlacaj samideanoj, miaj neforgeseblaj amikoj el la lando de floroj kaj suno Brazilo: A. Couto Fernandes, Carlos Domingues, L. Porto Carreiro Neto eldonis la verkon, kiu sendube travivos kelkajn homajn vivojn sen iu ajn ŝanĝo.

La verko mem estas fundamente prilaborita, bazita sur la plej konataj lingvaj verkaĵoj, inter ili de Majstro Zamenhof mem kaj aliaj lingvistikaj verkaĵoj, la verko, kiu ĉerpis vortojn el 19 diversaj vortaroj, meritas specialan atenton de ĉiuj, kiuj komprenas valoron de la nova lingvo.

Post unu jaro ni festos la jubileon de Esperanto: antaŭ 50 jaroj aperis la unua modesta verketo de Ludoviko Zamenhof. Nun disvolviĝis jam granda literaturo de la majstra malkovro.

La vortaro ĵus menciita staras inter plej eminentaj fundamentaj verkaĵoj, kiu servos por disvastigi Zamenhofan helpan lingvon en la bela lando de proksima estonto — Brazilo.

**Prof. Dr. O. Bujwid.**

Rumana Esperantista Societo, Str. Dr. Istrati 10, Bukureŝto, Rumanujo, aranĝas baldaŭan publikan ekspozicion. Taŭga materialo, urĝe bezonata. Al helpemaj antaŭan dankon kaj promeson pri rekompenca respondo.

# SKOLTA ANGULO.

**XIV-a Intern. Tendaro de SEL.**

Kiel jam anoncite, la nunjara SEL Tendaro okazos Anglujo (18—29. VII), en ĉirkaŭaĵo de Ipswich. La organizantaro faras ĉion, ke la Tendaro estu brila festo de nia movado. Oni jam interrilatiĝis kun ĉiu grava nacia skoltasocio, kiu espereble sendos reprezentanton. Detalojn petu de: XIV-a SEL-Tendaro, 54 Constable Road, Ipswich Suffolk-Anglujo. Komitato liveros ankaŭ of. organon „Skolta Bulteno", (kiu aperas nun en nova vesto) por interesitoj enhavantan precizajn informojn. (Jarabonprezo kun membreco al SEL 2 ŝil. anglaj.)

**Skolta Konferenco en Vieno.**

En la kadroj de l' Viena Kongreso (8—15. VIII.) verŝajne okazos la kunveno de esp. geskoltoj por tiuj, kiuj ne povos partopremi en nia SEL.-Tendaro. La Estraro de SEL invitis sron Emil Mayer el Kraków, ke li gvidu la konferencon. Oni esperas, ke la ĉeestantaro estos sufiĉe multnombra. Jus la fervora „lupidestrino" Ildikó Pap (hungara SEL-agentino — bone konata de l' Spała-jamboreo forveturis Vienon por prepararanĝi skolt-konferencon. Inter geskoltoj, kiuj anoncis partoprenon en la kunveno, estas nia SEL.-ĉefagentino Mary C. Groen el Anglujo.

**Kunlaboro de skoltoj kun blinduloj.**

De la Spała-SEL-konferenco laŭ la plenumo de ĝia rezolucio, la interrilato de Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj kun SEL estas pli aktiva. En la gazeto „Ligilo por vidantoj" aperis interesa artikolo de s-ro W. P. Merrick (Anglujo) pri la skoltismo inter la blinduloj. Baldaŭ ni atendas artikolon pri tiu ĉi temo, verkitan de bone konata angla kompetentulo, s-ro R. Robertson. En la nova nro de „Ligilo por vidantoj" vicprezidanto de UABO s-ro kpt. Jan Silhan (Polujo), priraportis laŭdindan rezolucion de SEL en Spała pri la kunlaboro de skoltoj kun blinduloj.

**Skoltinoj varbas.**

Dank' al skoltinoj I. Chwiałkowska kaj H. Gryglasówna (partoprenintinoj de Spała-SEL-Tendaro) oni organizis en urbo Łódź esp. kurson, en kiu partoprenas geskoltoj kaj gvidantinoj, kiuj antaŭe ne estis tre favoraj. Laŭdinda laboro!

# VENAS PRINTEMPO.

Jam alaŭdetoj-sonoriletoj
En la ĉielo laŭtan faris bruon...

Venas printempo. El urboj kaj urbetoj — tra vojoj kaj stratoj vagadas gajaj kaj ĝojplenaj aretoj da ĉiam migranta skolta popolo. Migras malgrandaj, fungoformaj lupuloj kaj maldklongaj roveroj. Migras kuraĝaj skoltoj kaj mildkoraj, bluokulaj skoltinoj. Granda, migranta popolo.

Vesperiĝas, Brulas Fajro. Hela, gaja fajro, — simbolo de amo, frateco kaj ĝojo. Skoltestro vokas al preĝo. El lipoj flugas alten simplaj, sed varmaj kaj sinceraj vortoj:

Dio, Vi vidas, ke vivon nian tutan ni volas oferi al servo por Vi — kaj por la Nacio. Sanktigu do volon nian kaj benu ĉiun agon, entreprenitan per komuna laboro. Penado de patroj niaj, kiuj en defendo de sendependeco sangon elverŝadis, rememorigu al ni, ke verkon per sango ekkomencitan, ni per malfacilaĵoj de ĉiutaga vivo devas fini. Por ni la helpon, por Polujo disvolvon kaj pacon — ni petas Vin, Dio. Amen.

— — — — — — —

Ne moviĝas jam lipoj, sed eĥoj de la lastaj vortoj longe ankoraŭ flustras inter arbaraj folioj, portante koran varmon kaj purajn sentojn alten, alten ĝis la piedoj de Kreinto — ĝis la steloj — brilantaj — helaj.

Momenton daŭras silento. Kaj subite — kiel je la signo el ĉiuj brustoj potence kaj forte eksonoras malnova skolta — bela kanto-preĝo:

Ho Di', Sinjoro, Nia Patr'
En gardo tenu nin,
Korbaton ja de skoltfratar'
Tre bone konas Vi.
Ĉar por Vi kaj Patrujo
Ni volas vivi, Di'!
Al skoltaferoj ĉiutage
Servi en harmoni'.

— — — — — — —

Post nova mallonga silento trumpetisto donis signon: Iru dormi! Miksita kun eĥoj migris trumpetsono, akompanata de la skoltfrataj murmurvoĉoj:

Iras nokt'...
Suna or'
De la mont'
de la kamp'
de la mar'

Iris for —
Dormu vi — !
Di' kun ni..
Di' kun ni

— — — — — — — —

Ekregis nokto. Ripozo — sonĝo. Ĉarma, printempa nokto. Trankvile dormas la tendaro en konvinko, ke: Di' kun ni!

**Józef Toczyski.**

Lwów, marto 1936.

## 28. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

Wien 8—15 de aŭgusto 1936.

**Komuniko Nro 3.**

**Kotizo** ĝis 30 de aprilo: sv. fr. 23.—, por familianoj 14.25, por gejunuloj malpli ol 18-jaraj 9.50. Ĝis 30 de junio: sv. fr. 25.50, 16.— kaj 10.80.

**Programon** provizoran kaj detalojn pri la ekskursoj ankaŭ de tiu „Tra Aŭstrio", ni prezentos en venonta komuniko.

**Karavanon** el Polujo organizas P.E.D., kiu prizorgas sekvantajn pasportojn: 1) kolektiva pasporto por 5-taga restado en Wien, veturado (tien kaj ren komuna) per III kl. de rapidvagonaro de Zebrzydowice al Wien kaj reen al Zebrzydowice kun vizoj zł. 77.50; 2). pasporto valida 15 tagojn (por partoprenantaj en la ekskurso „Tra Aŭstrio" post la Kongreso), veturado per III kl. de rapidvagonaro de Zebrzydowice al Wien kaj reen al Zebrzydowice kun vizoj zł. 150.—. 3). pasportojn validajn 30 tagojn, kies posedanto povas laŭdezire iri Aŭstrion kaj reveni, ne ĝenata de la programo de la suprecititaj vojaĝantoj — prezo kun vizoj (sen veturprezo) zł. 140.—.

Por ricevi pasporton oni bezonas la postulatajn dokumentojn kun la permeso de la starostejo.

P. E. D. klopodos ankaŭ pri fervojrabato en Polujo.

**Administraj** kostoj zł. 4.—.

Por orientiĝo ni tre petas ĉiujn dezirontajn veturi Kongreson **anonci sin jam nun, sen iu sindevigo!** Temas nome pri proksimuma nombro da voluntuloj!

Ĉe demandoj aldonu pmarkon por respondo.

**Ludwik Kutscher**
Ekzekutiva ano de P.E.D.

## RADIO

**Polaj radio-stacioj disaŭdigos la jenan Esperanto-programon:**

(Dissendos la stacioj de Kraków kaj Warszawa je 22.45 — 23.00 laŭ Mez-Eŭropa Horo).

14. 4. D-ro P. Kontny: Huculujo (Huculoj estas gento loĝanta en sudorienta angulo de Polujo).
28. 4. S-ino S. Adamowicz: Kongreso de virinoj kun superaj studoj.
19. 5. Dro Jan Gadomski: Akirajoj de pola astronomio.
16. 6. Prof. D-ro O. Bujwid: Malfacilajoj de rekonstruado de Pola Ŝtato.

Bonvolu nepre aŭskulti ĉi tiujn gravajn prelegojn kaj poste skribi al: Polskie Radjo, Warszawa, Polujo, — por ke la radio-estraro konstatu la daŭrantan intereson por la Esperantaj dissendoj kaj siavice daŭrigu tiujn dissendojn! Al vi la skribado de letero aŭ poŝtkarto kostas nur iom da klopodo kaj kelkajn centimojn por afranko, sed por nia afero la radio-dissendoj havas eminentan signifon.

———

Esperanto faras gravajn paŝojn sur la radio-kampo kaj ĉiutage okazas pluraj elsendoj per aŭ por Esperanto (eĉ 9 kelkfoje).

Sed ĝis nun ne estis grava gazeto esperantista radiista. Ekzistis diversaj cirkuleroj kaj la multobligita Internacia O. S. Bulteno. Anoncojn, oni faris ankaŭ en la gazetoj esperantistaj kaj aliaj.

De ĉi tiu monato, Radio-Klubo Esperantista de Francujo eldonas belan gazeton, kiu aperos ĉiumonate, ĉiudusemajne, laŭ la enirontaj abonoj. Ĝin redaktas nia amiko Alglave kaj donante la programojn tag-post-tage ĝi estos tre utila.

Ĝi mankis en Esperantujo, nun ĝi ekzistas kaj deziras vivi kaj plivastigi la sferon de siaj legantoj... tio, ne dependas de ĝi, sed de vi ĉiuj, estimataj samideanoj. Do, aktive deziru bonan sukceson al la nova Internacia S. O. S. Bulteno sendante viajn abonojn, konigante ĝin inter viaj samgrupanoj. (Jarabono: Francujo kaj landoj aliĝintaj al Interkonsento de Stockholm: 9 fr. fk.; aliaj landoj 12 fr. fk.).

Oni skribos, sendos monon, petos senpagan specimenon al s-ano Alglave Michel, 150, rue Cronte-Voye, à Blanc-Misseron (Nordfrancujo).

La aperigo de tiu gazeto, kiu temas nur pri la esperantaj radio-elsendoj estas fakto, kiu en ĝi mem montras la progreson de nia lingvo sur la radio-kampo.

## KIAMANIERE GAJNI 100 DOLAROJN?
**kaj iri al Tendaro en 1937?**

La Junulara Komisiono (Tutmonda Ligo por Internacia Amikeco per Eklezioj, Kristana Vivo kaj Laboro, adreso: Genè-

ve, Svislando, 2 Rue de Montchoisy) organizas konkurson por junularo pri temo: „Kristo kaj la universala frateco". Partopreni povas gejunuloj inter 15 kaj 23 jaroj, sed inter 19 kaj 23 jaroj oni devas pli precize pritrakti, kion faru la eklezioj, precipe la eklezio de la skribanto, por la mondpaco. Premioj 170 dolaroj, 100 dolaroj kaj malpli altaj; entute 118 premioj; disdono ĉe kristnasko 1936. Entute 36 monpremioj kaj 200 honormedaloj. La premioj uzeblaj por eksterlandaj tendaroj kaj volaĝoj, se iu deziras. Inter la lingvoj estas ankaŭ E s p e r a n t o, do sendu multa'n konkurslaborojn en Esperanto! Pliajn detalojn petu de supra adreso! Konigu al viaj amikoj!

# POLLANDA KRONIKO.

**LWÓW.** — Esperanto-kabaredo. Malĝojaj estas la nunaj tempoj. Malgraŭ fervoro, propagandemo, ni lvovaj gesamideanoj, vidas ne tute kontentiĝan ĝis nun rezulton de nia senlaca laboro por la venko de la verda stelo.

Antaŭ nelonge fondiĝis „komitato", kiu celas — per amuzo, kanto, teatraĵo ekveki la intereson de la vasta publiko.

Ni fondis Esperanto-kabaredon, dank' al la lerta, vigla reĝisorado de s-ano s-ro **M Altstock.**

Belegaj polaj kantoj, prezentitaj de S-roj **Friedmann kaj Juveles,** ravis la aŭskultantojn. Nia „Primadono", bela **fraŭlino Edda Bernadiner** brilvoĉe, petolmie ne ĉarmis la fervore aŭskultantajn gegastojn.

S-ro Altstock, nia reĝisoro amuzis nin per „ebriaĵoj", **Mgr. B. Berger** kaj **Mgr. N. Herr** prezentis lerte „konferaĵojn" — pol.-esp. lingvajn.

Bonega poresperanta propagando estis la polesperanta skeĉo. verkita de **F-ino Tanjo Steiger** „Miskompreno", bone ludita de infanoj, kaj „Kurso de Esperanto", skeĉo polesperanta en kiu partoprenis **s-ro Altstock, f-ino Zofja Jürgens** kaj S-ro **Julius Mann,** elvokis senfinajn ridon kaj aplaŭdon.

Surpaŝis la scenejon la konata kunagintino en grandstilaj „Vienaj Vesperoj" s-anino **Minuŝka Mantel,** kiu diversmaske, diversvoĉe kopiis multajn naciajn reprezentantojn, parolantajn Esperante, en sia propra skeĉo „Esperanto antaŭ la mikrofono". La samideanino fine salutis germanlingve, invitante al „Viena Mondkongreso".

Daŭrigante la amuzan parton, f-ino Minuŝka Mantel „mortpafis" sin en sia propra skeĉo „Mia Testamento", danke aplaŭdita kaj entombiĝita.

Fine eksonis la adiaŭkantoj, komponitaj de s-ro **Weinstraŭb,** fortepiane akompanitaj de S-roj **Immerdauer** kaj **Spiegel.** Danke salutitaj, fervore aklamitaj de 200 personoj, ili forlasis sian scenejeton. La verda sukceso instigos ilin al pludaŭra gaja propagando sub la devizo „la ridanta verda stelo".

**RADOM.** La 15-an de marto 1936 j. okazis jara kunveno de Pola Esperantista Klubo en Radom. Jaran agadon de la forkurinta jaro raportis s-ro Prezidanto Sztec kaj poste okazis vigla diskuto. — Post la diskuto kaj post raporto estis elektita nova estraro de P. E. K. Radom, kiel prezidanto unuanime estis elektita s-ro Podgórski Zbigniew, kiel estraro s-roj Sztec, Duljas, Felter Woliński. — En liberaj proponoj kunvenantoj postulis, ke oni aranĝu ĉiumarde esperantistajn vesperojn, kio estis akceptita kun aplaŭdo.

**SZAMOTUŁY.** Kiel en la antaŭa jaro, tiel ankaŭ en la nuna prof. B. Maske komencis novan kurson de Esperanto por lernantoj de la ŝtata gimnazio. La kurso estas senpaga kaj nedeviga; oni uzas la bonan lernolibron de prof. Sygnarski; partoprenas 20 lernantoj kaj lernantinoj. — Krom tiu ĉi kurso prof. M. gvidas ankoraŭ lecionojn por progresintaj de la antaŭa kurso.

**La Redakcio petas pardonon, ke pro alveno de aktuala materialo lastmomente, estas devigita prokrasti kelkajn artikolojn ĝis la venonta n-ro.**

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR. 29. -- KONTO P. K. O. NR. 406.660.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.

Drukarnia L. Gronusia, dzierżawca J. Kowalski. Redaktor odpowiedzialny: Dr. Leon Rosenstock.